

# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO



Volume 5

Numero 5

JANUARO- MARTO 1977

**Trimonata revuo**

# S ☆ E ☆ L

SKOLTA ESPERANTO LIGO

Postbus 433

Zaandam Nederlando

Poŝtĝirkonto 54.36.47

\*\*\*\*\*

Fondinto "Avoto", A.W.Thomson.  
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:  
Avoto, Norman Booth, D. H.  
Davis, L. J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggren,  
Brattvollveien 23c, Oslo 11  
Norvegujo. Tel. 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer,  
Taxisstraat 7, Zaandam-1400  
Nederlando. Tel. 075-166931.

Kasisto kaj Administranto de  
"La Skolta Mondo": David H.  
Withey, 21. Brookfield  
Avenue, Waterloo, Liverpool  
L 22 3ye, Britujo. Tel.  
051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach  
Nergata 37c, 6500 Kristiansund  
N, Norvegujo. Poŝtkto:  
8030413. Tel: 073-77620.

Membroj de la Centra Komitato:  
Allan Fineberg, 76 Sev-  
enteenth Av., Paterson, NJ-  
07531, Usono.


Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni  
1-tyōme 200, Higasi-yodogawa  
-ku, Osaka-si, Japanujo.

\*\*\*\*\*

La Skolta Mondo aperas kvarfoje  
en la jaro.

Okaze de nericevo, bonvolu in-  
formi la Nacian Rezentanton  
aŭ la Administranton.

Kotizojn oni prefere pagu al la  
Nacia Rezentanto. Se tia ne  
estas en la lando, prefere al  
la Kasisto!



diversaj kaŭzoj mi devas peti la indulgon de la legantoj!

La unua afero estas problemoj de la valutoj. Kiel vi scias, dum la lasta tempo la angla mono perdis sian valoron, kaj pro tio transpago de mono el Anglujo al Norvegujo fariĝis ĉiam pli sensaga. Nia gazeto ĝis nun presiĝis en Norvegujo, sed nun eble iu angla presejo povas fari tion pli mal-kare por ni.

Kaj Brita Esperanto-Asocio pretis fari al ni tiun servon. Ni vere dankas pro tio.

Sed jam en januaro mi eklaboris - sed hezitis. La norvega presejo akceptas la manuskriptopaĝojn en du formatoj - A4 kaj A5. Mi faras la paĝojn tute pretaj al ofset-presigo. Ĉu ankaŭ la angla presejo akceptas la manuskriptojn en du diversaj formatoj? Ĉu la fotoj estu traktaj sammaniere? ktp.

Mi skribis al la presejo pri tio en letero de la 27.a de januaro, kaj petis urĝan respondon. Sed ĝis hodiaŭ la respondo ne venis!

Alia afero estas problemoj, kiuj devenas el la fakto, ke post la vintra duonjaro, post kiam la instruado en la lernejoj ĉesos, mi transloĝiĝos al alia paroŝo, al alia urbo, al alia parto de nia lando. Ankaŭ tio kreas problemojn por la redaktada laboro, kaj ne nur por unu numero, sed eble por la tuta jaro.

Tial: Havu indulgon, se la revuo ne estos same preciza dum ĉi tiu jaro. Mi faros mian plejeblon - sed malfacilaĵoj estos!!!

*Hans Amund*

## la prezidanto vizitas WAGGS

La Monda Oficejo de la Skoltina Movado troviĝas en Londono: WAGGS, World Association of Guides and Girl Scouts.

Laŭ interkonsento kun la direktorino de MO mi vizitis (proprakoste, kompreneble) la oficejon la 2-an de Decembro 1976, kaj havis tre ege interesan kaj valoran interparolon dum 45 minutoj. Partoprenis en la konversacio la Direktorino de MO, Miss Lyn Joynt, kies foto beligas la unuan paĝon de tiu ĉi numero, la Internacia Komisararo, Miss Barbara Stiles, kaj mi. Ni interparolis en la angla.

Mi klarigis pri SEL, pri niaj celoj kaj nunaj taskoj - pri la bezono de Esperanto, ĝenerale kaj precipe por la skoltoj, - pri la evoluo de multlingveco en UNO kaj en la skolta movado, - ekzemploj pri malfacilaĵoj dum Nordjamb-75, - Naciaj lingvoj kompare al Esperanto, lingvaj neŭtraleco kaj facileco ktp.

Miss Joynt siaflanke klarigis pri la situacio de la skoltinoj, kiuj nun emfazas 7½ milionoj da membroj en 94 landoj. Ili jam akceptis 3-an oficialan lingvon, la hispanan (krom la anglan kaj la francan). Ĉiuj artikoloj en la oficiala organo COUNCIL FIRE ankaŭ aperas en la 3 lingvoj. En la oficeja stabo deĵoras personoj el 17 nacioj, sed tamen oni sentas la lingvajn barilojn. Miss Joynt rakontis interalie, ke ŝi la antaŭan tagon revenis el vizito al Kanado, kie ŝi spertis, ke kiam ŝi alparolis homon en la angla, ili respondis en la franca, do signo de lingva prestiĝo!

Ŝi cetere havas fortan simpatian por Esperanto (ŝi eĉ iam partoprenis Esperantokurson, ŝi diris), kaj ŝi promesis plenan helpon al SEL!

Tial mi kun granda ĝojo povas raporti, ke ŝi - kun aniĝo de Miss Stiles - jesis al miaj sekvantaj proponoj:

1. permeson verki artikolon pri Esperanto al COUNCIL FIRE (mi sendis la manuskripton jam la 15-an de decembro)
2. mendon de 110 libretoj de nia nova PLIVASTIGITA HORIZONTO EN INTERNACIA SKOLTADO.
3. Ili sendos la libreton al ĉiuj 94 landoj kie ili havas sekciojn (al la ĉefskoltino aŭ la Internacia Komisararo).
4. Ili reklamos por niaj libroj (ankaŭ por la lernolibro JAMBORA LINGVO), kaj deziras prezliston de niaj diversaj libroj (kiujn mi kunportis al Londono).
5. Ili jesis al mia peto prezenti por la venonta World Committee-kunveno en Londono

## el la naciaj sekcioj

**BRAZILIO.**

Pro multaj okupoj nia NR E.C. Soares ne plu povas funkcii kiel reprezentanto de SEL en sia lando.

Li restos fidela al SEL, kaj helpos nin kie tio eblas.

Kiel nova reprezentanto por tiu lando, kie ni havas multajn amikojn, helpos al SEL Adonis Marcelo Saliba Silva, Av. Olegario Maciel, 274, Apto 1211. 3000 Belo Horizonte, MG.

Same kiel ĉe la Skolta Asocio de tiu lando, ankaŭ SEL dividos la landon en ses regionoj, por kiuj ni klopodos trovi regionajn reprezentantojn.

Adonis estas juna inĝeniero pri metalurgio.

Averto: Ekzistas ebleco ke la adreso post nelonge ŝanĝiĝos. Nian koran dankon al ambaŭ!


**ITALUJO.**

En la regiono de BERGAMO grupo de 15 skoltoj samtempe aliĝis al SEL!

Eble oni pro tio povus gratuli la instruiston: Amiko A Ghislandi, Via Ghislanzoni 37, I 24100 BERGAMO.

**SIRIO.**

Studento GHASSA T Mawsily, 7 Moussily Bldng, Str Al-Mal' 'ah, Damasko, Siria Araba Respubliko, 20-jara - aktivas por SEL en sia lando, jam instruis al amikoj kaj sia 11-jara frateto, per jamborea lingvo. Li antaŭvidas aktivecon inter skoltoj



## NORVEGUJO.


Norvega Skoltknaba Asocio favoras Esperanton! Tion oni povas denove konstati (memoru la bonan helpon al SEL dum Nordjamb-75), ĉar en la nova "SKOLTLIBRO", aperinta en decembro 1976 troviĝas trifoje mencio de Esperanto. Sur paĝo 286 estas tre bona artikolo (3/4-paĝa) pri Esperanto, kaj sur paĝo 284 en formo de letero al eksterlanda amiko oni jam en la titolo uzas la esperantolingvan saluton KARA SKOLTA AMIKO kaj en la letera teksto oni mencias Esperanton kiel facile lerneblan lingvon. Fine en la indekso sur paĝo 299 aperas la vorto Esperanto sub litero E. Do bona informo pri la Internacia Lingvo por la 24.000 skoltknaboj nun apartenantaj al Norvega Skoltknaba Asocio. Imitinda ekzemplo por aliaj naciaj skoltasocioj.

## BRAZILIO.

Volas korespondi kun okc. Eŭropo  
Aureluz Figueiredo,  
Caixa postal 7302,  
01000 Sao Paulo, SP. Li estas 37-jara.

## ITALUJO.

La juna skolto  
Parisi Mario,  
patrolo Cobra,  
Via Fleming 8,



aprilo 1977 proponon de SEL pri akcepto de la Internacia Lingvo Esperanto kiel komunan lingvon por skoltinoj, precipe por tiuj, kiuj ne komprenas la 3 oficialajn lingvojn.

Do mi estas tre kontenta pro la vizito kaj la rezultoj tie atingitaj, kaj mi ne dubas pri kreskanta intereso por Esperanto inter la skoltinoj tutmondaj.

John Berggreen.



## NORMAN BOOTH FORLISIS NIN

kaj reiris al la Eterna Hejmo fine de la lasta jaro en la aĝo de 82 jaroj. Li naskiĝis en Huddersfield (Britujo) la 9-an de Aprilo 1894 kaj nomis sin angla-katolikon. Li estis edziĝinto, laŭ profesio hotelisto, sed kompreneble emeritiĝis. Interesiĝinto al lingvoj Booth konis diversajn lingvojn, kia estas rare por angla-lingvanoj: francan, norvegan, italan kaj rusan krom anglan kaj Esperanton. Li estis membro de la Brita Esperanto Asocio, Universala Esperanto Asocio, Veterana Esperantista Klubo kaj kompreneble de S.E.L.

Norman Booth skoltiĝis en 1909 kaj esperantiĝis en 1913. Ne estas miriga, keli tuj iĝis membro de SEL kiam "AVOTO" je la fino de la unua mondmilito fondis nian Ligon en Francujo...malantaŭ la fronto. Li aliĝis en 1918 kiel grupestro. Poste li iĝis komisaro skolta Booth ne estis pasiva membro, sed tuj iĝis la tria sekretario de SEL (1922-1936). Sub lia impulso SEL rapide kaj firme etendiĝis, ne sole en Britujo, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj. Li organizis plurajn internaciajn SEL-tendarojn, i.a. en Ruisbroek (1923) apud Bruselo (Belgujo), kie mi renkontis lin por la unua kaj ankaŭ - bedaŭrinde - por la sola fojo. Sed ni estis kaj restis dum multaj jaroj en korespondaj interrilatoj. Mi neniam forgesos lian afablecon kaj precipe lian pretecon. Li estis modela homo laŭ la skoltaj kaj esperantistaj principoj. Devis esti por Norman granda plezuro memori, ke en la SEL-tendaro de Beek apud Nijmegen (Nederlando) partoprenis juna brita skolto, kiu iĝis pli malfrue, kaj tio kvarfoje, la ĉefministro de Britujo: Harold Wilson.

Post longa servo kiel dinamika kaj servema Sekretario, Norman Booth fariĝis Prezidanto de SEL (1936-1940), sekvinte al la fondinto-prezidanto AVOTO, nia ankoraŭ vivanta honora

prezidanto. Estas ege bedaŭrinde, ke la dua ĉesigis por la bono de SEL la intensan agadon de Booth. Post la milito li ne plu reprenis la taskon, sed lasis la lokon al pli juna, Douglas H. Davis. Sed Booth restis fidela al siaj skoltaj kaj esperantistaj idealoj. La devizo "IAM SKOLTO, CIAM SKOLTO" estis sankta al Norman Booth.

Eni nia SEL-Agado ni dankeme memoru tian dignan skoltfraton. Ni ne nur funebras pro lia forpaso. Liaj laborfortoj kaj kapabloj igis lin ŝatata kaj honorata inter tiuj, kiuj konis lin persone, kiel de tiuj, kiuj nur letere kontaktis lin.

Kara Skoltfrato Norman, ripozu en Paco!

J.V.G.

## JARRAPORTO

Plej notindaj faktoj en la jaro estis:

1. la granda aktiveco por la eldono de libreto pri internacia skolta kunlaboro.
2. intensivaj kontaktoj kun la Mondaj Oficejoj de la du geskoltaj organizaĵoj, kaj
3. sanĝoj en la reto de Naciaj Reprezentantoj.

### LA ELDONAJ AKTIVECOJ.

La laboroj bone progreŝis tamen ne sen malfacilaĵoj. La plano pliampleksiĝis, anstataŭ eldonoj en du lingvoj nun ok eldonoj estas preparataj.

Jam antaŭ la oficiala prezento al la Skolta Konferenco en julio 1977 la libreto ludos rolon en la kunveno de la Skoltina Komitato aprile.

Inter la lingvoj estas la araba kaj la japana, parte por apogi la klopodojn al disvastigo de Esperanto al Azio kaj Afriko de UEA, parte pro prestiĝaj konsideroj.

### KONTAKTOJ KUN LA SKOLTA MOVADO.

La ĝenerala sekretario de la Skolta Movado, D-ro L. Nagy, konsentis verki antaŭparolon por nia eldono. De la Monda Oficejo en Genevo ni ricevis valorajn konsilojn kaj helpon.

La gazeto WORLD SCOUTING publikigis artikolon de nia prezidanto, tamen kun negativa aldono de la redaktoro. Pro ricevitaj plendoj oni poste akceptis duan artikolon.

BLOGNA I-40141,

eklernis Esperanton, kaj ŝatus ricevi salutojn el eksterlando por montri al siaj ĝeamikoj.

POR CIU EL NI ekzistas la ebleco fari ion:

Ĉu vi pripensis la eblecon informi pere de la nacia esperanto-revuo? La progreso inter skoltoj ja dependas de tiuj kiuj jam regas la lingvon. Aŭ pere de naciaj skolto-revuo? Ekzemple pere de korespondpeto, en kiu vi nomas la lingvon de la korespondo ESPERANTO.

SEL - BUTIKO.

Kiam vi mendasinsignojn, librojn ktp bonvolu kombini malgrandajn mendojn pro la laboro kaj la af-rankoj.

Kiam vi pagas: SEL nun havas propran poŝtĝirokonton: SEL, Zaandam, numero 54 36 47.

Bankkonto: Algemene Bank Nederland Zaandam, 58 85 40 560. Sed ĉiam memoru, ke la banko deprenas 5 guldenojn de via pago!!!!

Nia aperonta libreto kostos po 1.50 ned gld., kaj en kvantoj nur 1 gld Mendu indikante la lingvon kiun vi deziras!

Sendado per aerpoŝto ne eblas pro la altegaj kostoj.

SVISLANDO.

Oni aranĝos denove - jam la 18-an Eŭropan Ferio-Semajnon en Svislando en Berna Oberlando. La loko nomiĝas Wengen, situas en alteco de 1275 m vidalvide al la fama montmasivo Jungfrau (4158 m)

Tempo: 4a - 10a de sept. Prezo: 355 sv fr - 415 Adreso: Glättli, Laurstr 17, 5200 Brugg.



## 3.a

"La Neŭtrala Esperanto-Movado" anoncas sian 3. an internacian konferencon en Humlebæk, Danlando, la 23. an - 30. an de julio.

Prelegantoj estas prof. d-ro Lapenna, prof d-ro Pennacchiotti, diplomita matematikisto Maas, doc Trærup, prof Hærburger kaj prof Waringhien.

Informas: H.V.Rasmussen Bygtoften 8, DK- 2800 Lyngby.

## Oni legis

La gazeto de Sudaŭfrika Esperanto-Asocio, "Bona Espero", en sia decembra numero 1976 redonas el LSM la artikolon MARGARINO. Oni atentigas, ke la artikolo venas el La SKOLTA MONDO, sed bedaŭrinde ne la nomon de la aŭtoro:

Bengt Olof Nilsson.

## Poŝtm.

En Ĉeĥoslovakio oni aranĝis unikan ekspozicion kie oni prezentis sep kolektaĵojn je la temo Esperanto.

Ciu el la 7 kolektaĵoj estis premiitaj.

La Asocio de ĉeĥoslovakaj filatelistoj kreis esperantosekcion kunlabore kun Ĉeĥa Esperanto Asocio.



N.Booth 1894-1976.



En decembro nia prezidanto vizitis la Skoltinan Oficejon en Londono. La interparolo i.a. kun la direktorino F-ino L. Joynt, estis tre positiva. Oni promesis aktivan helpon en diversaj manieroj.

### LA RETO DE NACIAJ REPRESENTANTOJ.

La reto pligrandiĝis per novaj NR-oj en Peruo Meksikio kaj Maroko. Aliaj personoj transprenis la taskon en Italujo kaj Hispanujo. Dum la jaro la korespondado kun Portugalujo kaj Germanujo ĉesis pro neklaraj kaŭzoj.

### LA SKOLTA MONDO KAJ ĈIAM PRETA.

La Liga gazeto regule aperis en plaĉa aspekto kun iom malpli da paĝoj ol kutime. Estis kelkaj plendoj pri la "eŭropeco" de la enhavo kaj pro la "kristaneco" de artikoloj pri la spirita fundamento de la skolta vivo. La CK bonvenigos ŝanĝojn, sed ĝi dependas de la kunlaboremo de la gemembroj.

La bulteno por kunlaborantoj "Ĉiam Preta" nur dufoje aperis pro troa okupiteco de la sekretario.

### RILATOJ KUN LA ESPERANTOMOVADO.

SEL klopodis aktive apogi aktivecojn de aliaj organizaĵoj. Laŭ petoj de UEA ni sendis kelkcent lernolibrojn al nepagipovaj landoj.

La kontaktoj tamen ofte estis malefikaj, ĉar leterojn oni respondas nur malfrue aŭ tute ne, ĉe la plejmulto de organizaĵoj.

Komunikoj al Esperantogazetoj malofte havas rezulton; ĉar la sukceso de nia kampanjo grandparte dependas de la kunlaboremo de la Esperanto-publiko, tio ĉi estas grava plendo!

Bona escepto (kiel ĉiam) denove estis HEROLDO

### FINANCOJ.

La malplivalorigo de la angla valuto donas al ni iom da zorgo. La kapitalo por nia kampanjo tamen donis al ni pli da eblecoj ol ni supozis pro sindona, ofte senpaga helpo de multaj amikoj, kaj kelkaj favoraj ŝanĝoj en la teknikaj eblecoj.

### MORTO DE NORMAN BOOTH.

Nia prezidanto en la jaroj 1936-1940 kaj poste unu el niaj Honoraj Prezidantoj NORMAN BOOTH, mortis en Anglujo en novembro en aĝo de 82 jaroj. Li faris tre valoran laboron por SEL, kaj ni por ĉiam volas konservi la memoron de tiu lerta batalanto por la ideoj de SEL.

Zaandam/Oslo, februaro/marto 1977.

J.Berggreen

J.K. Hammer.

# Fabelo

Fabeloj estas tutmondaj. La apuda bildo estas norvega, la desegnisto Kittelsen en 1911 desegnis ĝin sub titolo "Trolo, kiu pripensas sian aĝon." Sed la bildo neniel rilatas al la suba fabelo, kiu estas el japana deveno, kaj kies titolo estas:

## LA VATA KOVRILO

Antaŭ multaj jaroj malgranda gastigantejo en Tottori akceptis sian unuan gaston, vojaĝanta komercisto. Oni akceptis lin pli ol ordinare afable, ĉar la gastiganto emis krei al sia loĝejo bonan reputacion. La domo estis tute nova, sed ĉar la gastiganto estis malriĉa, li aĉetis la meblaron ĉe iu, kiu brokantis malnovaĵojn. Sed ĉio estis pura kaj bela kaj taŭga. La gasto do bonapetite manĝis kaj trinkis sufiĉe da bona, varma saké'o. Poste oni ordigis la liton, kaj li enlitiĝis por dormi.



Kutime oni dormas profunde, trinkinte varman sakéon, speciale se la nokto estas malvarma kaj la lito varma. Sed la gasto dormis nur dum mallonga tempo kiam li vekigis pro la sono de voĉoj en la ĉambro. Du infanovoĉoj senĉese demandadis: "Grand-frato, ĉu vi frostas?" "Ne, etfrato, ĉu vi ne mem frostas?"

Ke infanoj envenis en la ĉambron ja povis ĝeni la gaston, sed surpriziga tio ne estis, ĉar en japanaj hoteloj ne estas pordoj, nur almeteblaj ŝirmiloj inter la ĉambroj. Ŝajne kelkaj infanoj misiris pro la mallumo, kaj envenis en la ĉambron. La gasto do milde riproĉis ilin, kaj dum momento ĉio silentis. Sed tiam afabla, sed plendanta voĉo diris tuj apud lia orelo: "Grandfrato, ĉu vi frostas?", kaj alia amplena voĉo respondis "Ne, etfrato, ĉu vi ne mem frostas?"

La gasto ellitiĝis, lumigis la lampon kun paperŝirmilo kaj rigardis la ĉambron. Neniu estis tie. La fenestrokovriloj estis fermitaj. Li malfermis la ŝrankojn, sed trovis ilin malplenaj. Mirante li enlitiĝis sed lasis la lumon, kaj li apenaŭ estis en la lito, antaŭ ol la voĉoj denove aŭdiĝis apud lia orelo:

Grandfrato, ĉu vi frostas?. Ne, etfrato, ĉu vi ne mem frostas?

Nun li sentis timfroston en si mem, ne pro la nokta malvarmo. Ade kaj ade li aŭdis la voĉojn, kaj ĉiam pli li mem timiĝis. Ĉar nun li komprenis ke la voĉoj venis el la vata kovrilo mem.

Li kolektis siajn aĵojn, malsupreniris la ŝtuparon, vekis la gastiganton kaj rakontis al li la okazintaĵon. Sed la gastiganto ekkoleris dirante: "Jen ni faris ĉion ajn por kontentigi nian gaston, kaj nun la honorinda gast

gasto trinkis tro da sakéo kaj songís malbone." Tamen la gasto ne volis resti, li pagis kaj foriris por trovi alian hotelon.

En la posta vespero venis alia gasto, kiu petis ĉambron. Kelkajn horojn post la enlitiĝo, la gastiganto denove estis vekita kaj aŭdis la saman historion. Kaj ĉiu tiu gasto trinkis nenium sakeón. La gastiganto nun eksuspektis, ke iuj konspiris kontraŭ li por detrui lian gastigejon kaj furioze diris: "Por konveni al vi mi ordigis ĉion en plej bona maniero, kaj jen vi venas kun vortoj kiuj profetas malbonon. Sciuj, tiu ĉi domo estas mia tuta komerco. Kial vi volas detrui ĝin per malveraĵoj?" - Sed nun la gasto ofendiĝis, fariĝis laŭtvoĉa kaj diris malbonaĵojn, kaj la du disiĝis en kolero.

Sed post la foriro de la gasto la gastiganto tamen pripensis, ke tio ĉi ja estas stranga afero, kaj li iris al la malplena ĉambro por esplori la kovrilojn. Kaj dum li estis tie, li mem aŭdis la voĉojn, kaj komprenis ke la gastoj nur parolis veron. Unukovrilo, kaj nur tiu unu, parolis. La alia silentis. Li kunprenis la kovrilon en sian propran ĉambron, kaj kuŝis sub ĝi dum la resto de la nokto. Kaj ĝis mateno la voĉoj diradis: "Grandfrato, ĉu vi ne frostas?" "Ne, etfrato, ĉu vi ne mem frostas?"

En la frumateno li iris serĉi la brokandiston, sed li povis nenion diri. Tiu mem aĉetis la kovrilon en alia budo, kaj la posedanto de tiu budo mem aĉetis ĝin ĉe eĉ pli malriĉa brokandisto ĉe la urba limo. La gastiganto iris de unu al alia kun siaj demandoj.

Fine li komprenis, ke la kovrilo iam apartenis al malriĉa familio, kaj li eklernis la historion de tiu familio: Patro, patrino kaj du infanoj antaŭ nelonge alvenis al la urbo. La infanoj estis knaboj ses- kaj ok-jaraĝaj. La patro malmulton gajnis per sia laboro, la patrino malsanis. En vintra tago ankaŭ la patro malsaniĝis, kaj post unusemajna malsano li mortis kaj entombiĝis. La patrino baldaŭ sekvis lin, kaj la infanoj restis solaj. Ili konis nenion al kiu ili povis sin turni por helpo. Tial ili vendis, por sin vivteni, ĉion vendeblan.

Estis nur malmulto: La vestaĵoj de la gepatroj, la plimulto de siaj propraj, kelkajn vatkovrilojn kaj aliajn ilojn. Ĉiutage ili vendis ion, ĝis restis nur unu sola vatkovrilo. Kaj jen venis tago, kiam ili havis nenion por manĝi, kaj la luo ne estis pagita.

Tio estis en plej akra vintro. La neĝo kunblovis en tiaj amasoj, ke ili ne kuraĝis iri eksterdome. Jen ili povis nenion fari krom kaŭri sub la sola kovrilo por kuŝi tie, tremblantaj pro malvarmo kaj kompati unu la alian laŭ la infana maniero: "Grandfrato, ĉu vi frostas?" "Ne, etfrato, ĉu vi ne mem frostas?"

Ili havis nek fajron nek bruligaĵon, la mallumo venis kaj la malvarmega vento ululis ĉirkaŭ la malgranda domo.

Ili timis la venton, sed eĉ pli ili timis la gastiganton, kiu envenis kun multe da bruoj por peti la lupagon. Li estis malmola viro kun malbona vizaĝo. Kaj vidante, ke neniu povis pagi ilian lupagon, li elpelis la infanojn en la neĝon, prenis la kovrilon kaj ŝlosis la domon.

Nun ili havis nur maldikan, bluan vestaĵon, ĉar la aliajn vestaĵojn ili jam forvendis por manĝaĵoj, kaj ili ne sciis, kien iri. Estis templo de Kwannon tute proksime, sed la neĝo estis tro profunda, ke ili atingu al la templo. Tial ili kuŝis sin malantaŭ la domo, tuj kiam la posedanto foriris. La malvarmo igis ili dormemi, kaj brakenbrake por teni la varmon ili ekdormis. Kaj dum ili dormis, la dioj kovris ilin per alia kovrilo - spiritece blanka kaj belega. Kaj ili ne plu sentis la malvarmon. Tie ili dormis dum pluraj tagoj, ĝis iuj preterpasantoj trovis ilin, kaj ili ricevis novan liton en la tombejo de la milbraka Kwannon.

La gastiganto, aŭdinte tion, donacis la kovrilon al la pastroj de tiu templo, kaj petis ilin fari preĝojn pro la spiritoj de la infanoj. Kaj post tio la kovrilo neniam plu parolis.

\* Kwannon: La diino de kompatemo.



# Ni ricevis

el Korea Respubliko n-ron 1 de la nova revuo "La Espero" presitan sur luksan paperon kun abundo da koloraj bildoj

Ni gratulas pro la eldono, kun la espero ke la venontaj numeroj donos same multon al la estetika sento, sed pli multon da informoj kaj legaĵo.

\*

el Hungarujo stokon da naci-lingvaj periodaĵoj kun - ŝajne - tre interesa enhavo, el kiu ni emus tondi, je plezuro de niaj legantoj Sed: Mi ne komprenas la hungaran lingvon, kaj sen traduko de la artikoloj, kiuj klarigas, la bildoj estas senvaloraj. Bedaŭrinde.

\*

el Novselando mimeografitan kajeron "Handbook of the New Zealand Esperanto Association" kun malgrandaj informoj pri historio, celo, financoj ktp kaj la kompleta membrolisto kun adresoj. Imitinda ekzemplo!

\*

el Belgujo leteron pri la Transcendenta Meditado, pri kiu la aŭtoro asertas, ke ĝi "estas tute neŭtrala, kaj povas komplete harmonii kun ia ajn filozofia, politika, socia kaj religia konvinko" Pri la lasta la teologoj ja dubas kaj diskutas, sed kiu havas intereson pri la arto meditado, skribu al: Ivo Durwael, Paul Gailsonlaan 5 B-2550 Edegem.

\*

el UEA informon pri la nova librolisto, kiun oni eldonos frue en tiu ĉi jaro. Ĝi celas esti klasifita listo de ĉio nuntempe aĉetebla en la Internacia Lingvo, inkluzive de periodaĵoj

\*

el Nederlando la libron "Vivo de laboristo en la kolonia kaj novkolonia epo-

# SKOLT - TENDARO

kun la bela nomo "Internacia Amikeco" okazos en Kibblestone, Staffordshire, Anglujo de la 23a de Julio ĝis la 14a de Aŭgusto 1977.

La tendaro okazos sub aŭspicio de

Skolt-Konsilantaro de Stoke-on-Trent kaj Newcastle.

Oni aranĝos, ke ĉiu el la eksterlandaj grupoj estos kunligata kun iu angla grupo, tiel ke la restado en Anglujo estu plene utiligota.

La tendejo havas i.a. butikon, kie oni mal-kare povas aĉeti. Tial la manĝaĵoj ne estas alkalkulitaj en la kotizo, kiu estas nur 25 pencoĵ por unu persono tage.

Samtempe povos tendumi ĝis 500 personoj. Pro tiu limigo oni deziras plej eble fruan sin-anoncon.

La aliĝon oni sendu al W.Webber, Stoke-on-Trent and Newcastle Divisional Scout Council 42 Marsh Street, Hanley, Stoke-on-Trent, ST1 1JD, Anglujo - kun informoj pri nomo de la grupo, lando, nombro de partoprenantoj, nombro de plenkreskuloj (Gvidantoj), sekso, aĝo kaj tempo de la restado.



Ni ankaŭ scias pri aliaj tendaroj, al kiuj oni deziras internacian partoprenon. Demandu ĉe via nacia skolt-asocio pri:

Islando - proksime al Reykjavik 19a - 24a de julio.

Germanujo proksime al Koblenz 28a de julio - 7a de aŭgusto.

Usono - 70 mejloj norde de Pittsburg, pennsilvanio 3a - 9a de aŭgusto.

Svislando - kursoj de montgrimpado por geskoltoj 9a - 16a kaj 16a - 24a de julio.

Skotlando 3 taga kampado + 7 taga migrado, 16a - 30a de julio.

Nederlando kampado ĉe Enkhuisen 16a - 23a de julio.

Valisio - ĉe Llanover 27a de julio ĝis 5a de aŭgusto.

Finnlando - en Norda Karelio apud la limo al Sovetunio semajna migrado en la sovaĝejo kaj semajna restado en finnaj hejmoj. 18a de julio ĝis 1a de aŭgusto.

Danlando - marskoltkampado ĉe Svendborg 27a de julio ĝis 3a de aŭgusto.

# pri Esperanto en world scoutisme scouting mondial

Post multaj klopodoj en 1974/75 fine aperis en 1976 miaj 2 artikoloj pri Esperanto en la oficiala organo de la skoltknaba movado en Genevo.

Mi sendis la manuskripton en la angla kaj oni en Genevo tradukis ĝin en la francan. La artikoloj aperis jene:

N-r 1 en la eldono n-ro 2 por aprilo-junio 1976 kaj artikolo n-ro 2 en la eldono n-ro 4 por oktobro-decembro.


Bedaŭrinde la redaktoro faris ŝanĝojn en la manuskriptoj en jena maniero:

En la unua artikolo oni forstrækis 2 sekciojn (pri miaj spertoj dum la jamboreo en Hungarujo 1933, kaj pri la disvastiĝo de Esperanto kaj la delegita sistemo.) En la dua artikolo okazis jenaj ŝanĝoj:

En la angla teksto aperis - je mia surprizo - tute mala esprimo ol mi uzis. Mi skribis, ke en kelkaj "hajko"-patroloj en Nordjamb-75 neniu (angle "none") de la 8 partoprenantoj el 8 landoj komprenis anglan aŭ francan (la 2 oficialaj lingvoj), sed en la presita artikolo staris ke kelkaj (angle "some") komprenis nek anglan nek francan! Espereble tio estis preseraro, kaj ne intence farita.

En la franca traduko forestis 2 frazoj, kie mi esprimis mian opinion, ke la filozofaj kaj teoriaj rimarkigoj de la redaktoro al mia unua artikolo, ne multe validas en la praktika vivo de la skoltoj, kaj ankaŭ malaperis ke mi pledas por Esperanto estante prezidanto de SEL.

Do, mi ne estas tute kontenta kun la prezento en WORLD SCOUTING, sed tamen alte taksas la valoron de artikoloj pri la Internacia Lingvo entiuoficiala tutmonda organo de la skoltknaba movado. J Berggreen.



koj" de J van Munster. Li verkis pli ol 100-paĝan biografion, per kiuli emas proklami sian sperton, ke la kaŭzo al ĉiu mizero de militoj kaj revolucioj estas troveblaj en la naciismo kaj la eklezioj.

\*

el Germanujo alian libron, "Manifesto de la paco" de Rudolf Zimmer kaj K. O. Schmidt. La intenco de la libro estas igi la unuopajn pensojn kaj penojn per si mem, ke li atingu al pli altaj celoj kaj kompreno de la ideoj de la vera kristanismo: amo.

\*

el UEA la numeron 855 (3) de "esperanto", do la marta numero, sur kies paĝoj 50 kaj 51 vi povas trovi kalendaron pri okazontaĵoj en la mondo de la esperantistoj. La titolo de la kalendaro estas: "Konfuzo granda elekto" kaj tiu titolo per si mem diras sufiĉe. Sed studu la kalendaron!

\*

el UEA informojn pri la 62a Universala Kongreso. Al la kongreso sin anoncis ĉ. 550 partoprenantoj el 38 landoj.

La bultenoj promesas interesan kongreson en interesa lando, i.a. kun vizito al la gejseroj.

Oni ankaŭ anoncas la antaŭkongreson en Skotlando, en Stirling.

\*

el KELI informon pri ties kongreso en Skotlando, en Edinburgo, en la sama semajno en kiu UEA aranĝos sian antaŭkongreson.

\*

**LA ST M O M E N T E :**  
Nia kasisto kaj administranto David H Withey en la tago de St. a George ricevos "La Argenta Glano" de la Brita Skolt-Asocio.



## NACIAJ REPREZENTANTOJ

- Aŭstralio: s-ro H.J.C. Brendel, 3/119 Kadumba Str., Yeronga - QLD 4104
- Aŭstrio: f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr Vieno.  
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
- Belgujo: s-ro Gert van Damme, Marie Jose-laan 31, B-2600 Berchem. Tlf 031-3035.43  
s-ro L.j. VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout.  
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Telefono (031)3688.08.
- Brazilio: s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, Av. Olegario Maciel, 274, Apto 1211 3000 Belo Horizonte, MG.
- Britujo: s-ro C.Bardsley, 26 Crossbank House, OL9 6JD Oldham, Lancs.
- Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.
- Finnlando: s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.
- Francujo: s-ro Patrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne
- Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.
- Hispanujo: s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81.
- Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.
- Italujo: s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173.
- Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado: s-ro John H.F.Hoyle, Box 421, Forest Ont.  
Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.
- Maroko-Agadir: pernato s-ro Emilo Mas, 39 Cite des Oiseaux, Inezgane.
- Meksikio: s-ro Jaime Javier Martinez Tellez, 8a, No 3604, Chihuahua.
- Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto 3335470
- Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach, Nergt 37c, N-6500 Kristiansund. Tel 073-77620.
- Novzelando: s-ro D.B. Pease, 6a Bay Road St Heliers, Aukland 5.
- Peruo: s-ino J.de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.
- Portugalujo: s-ro J.de Matos Correia, Rua Cidade da Horta, Lote q-5-3<sup>o</sup>, Pontinha, Lisboa 4
- Svedujo: peranto s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsqgt 25, s-11233 Stockholm.
- Usono: s-ro Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513.

### Informoj pri membreco:

En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.): Kotizo inkl. abono:

Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned gld 3.30 aŭ egalvaloro.

Pliaĝuloj: Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.

Subtenantoj: Minimume Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto. Vidu p. 2.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.

PLI ALTEN!  
AL NOVAJ CELOJ!



## LA SKOLTA MONDO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj:  
1-a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de  
Novembro.

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

NE ISSN 0037-6558

